

LANTERNOJ DE LA

MORTINTOJ

La turistoj kaj precipe la eksterlandaj vojaĝantoj, kiuj vizitas Francujon, kelkfoje miras, vidante strangajn ŝtonajn konstruaĵojn, plej foje turformajn, kies signifon ili ne scias, ĉar ili neniam renkontis tiajn turetojn en siaj propraj landoj. Se ili atente rigardas, ili tuj ekvidas, ke la supra parto de la konstruaĵo estas borita per truoj aŭ vertikalaj fendoj, kies celo estas ebligi al la preterpasantoj la vidon de interna lumo.

Fakte, en la pasinta tempo, dum pluraj jarcentoj, lumo daŭre aŭ almenaŭ ĉiunokte brilis en tiuj malgrandaj turoj, kiuj staris en la tombejoj, pro kio oni nomas ilin « Lanternoj de la Mortintoj » (franclingve : Lanternes des Morts).


Se oni pli zorge kaj detale observas tiujn konstruaĵojn, oni konstatas, ke iliaj formoj estas tre diversaj. La plej grandaj kaj belaj — ekzemple : tiu de FENIOUΛ, en la departemento Charente-Maritime — aspektas kiel eleganta fasko da kolonoj, kiuj ĉirkaŭas internan helikan ŝtuparon, per kiu la deĵoranto suprenigis la lampon ĝis la supra parto de la turo. En aliaj malpli dikaj turoj, rondaj, kvadrataj, kelkfoje ses- aŭ okangulaj, ne estas interna ŝtuparo, sed nur malsupra aperturo, tra kiu oni povis enigi kaj suprenigi la olean lampon en la traborita kolono ĝis la supro, pere de ŝnuro kaj pulio.

Plej ofte malgranda kruco surstaras la turon ; kelkfoje, ŝtono flankas la malsupran parton de la konstruaĵo, por la diservo. Sur unu el la Lanternoj — tiu de MOUSSAC, en la departemento Vienne — ne estas kruco, sed ŝtona globo.

Tiaj konstruaĵoj estas tipe francaj. Preskaŭ nur en Francujo oni povas vidi ilin en urboj kaj vilaĝoj. Sed nur malmultaj ankoraŭ staras, ofte ekster la tombejoj, ĉar la tempo, la militoj kaj revolucioj detruis multajn ; kaj precipe kiam, higiecele, oni translokiis ekster la loĝlokojn la tombejojn — kiuj antaŭe kuŝis ĉirkaŭ la preĝejo meze de la urboj aŭ vilaĝoj — oni detruis la « lanternojn de la mortintoj ». Tamen oni iafaje lasis ilin sur la lokoj, kies ili staris ; tial ni povas nun vidi kelkajn, kiel ornamaĵojn, en urbaj ĝardenoj aŭ sur vilaĝaj placoj, kiuj anstataŭis la estintajn tombejojn.

Proksimume nur kvardek « lanternoj de la mortintoj » ankoraŭ staras en Francujo. Preskaŭ ĉiujn oni konstruis dum la XII-a jarcento, laŭ la romanika konstruaro ; tiu de SAINT-PIERRE-D'OLERON — (« Sankta Peto » sur la insulo « Oleron ») — konstruita dum la XIII-a jarcento, estas bela gotika turo.

Ekser Francujo nur malmultaj tiaj « lanternoj »



estas videblaj. Oni povas trovi unu en Italujo (Toskanujo), kelkajn en Aŭstrujo (Tirolo, Bohemujo) kaj unu en Sirio, en la tombejo de SAINT-JEAN-D'ACRE — (« Sankta-Johano-de-Akro ») — kie ĝin konstruis la